ANTAŬEN suplemento de Informilo 3/27 decembro 2019

Enhavo: Kristnaska mesaĝo; Fabelo; Pri bona koro; Kristnaska deziro

Kristnaska mesaĝo

En la tuta mondo, la kristana rondo
en preĝejaj festoj kaj per korespondo
Kriston rememoras, multaj Lin adoras
kaj la sonoriloj en ĝojkant´ sonoras.

Sed malmultaj scias, ke – se l´mond´mencias
tiun sanktan Nomon, Lin ĝi ne konscias –
Kristo, la Mesio de l´ plej bona Dio,
venis al la mondo, alta kun misio:

Instruadi Veron, de l´ spirit Liberon,
al ĉiela vivo similigi Teron.
Per naskiĝ´ humila, per labor utila,
per la granda amo, per instruo brila

montris Li la vojon por atingi ĝojon
veran kaj forlasi jam la lastan fojon
dubojn kaj eraron de l´ malbon´ la maron
kaj per sinofero servi la homaron.

Estu la instruo viva de Jesuo
klara vojo al la homa evoluo:
de infano plora al la vir´ labora,
de la mort-elspiro al Spirito glora!

Antoni Grabowski

Kial estis azeno kaj bovo ĉe infanvartejo.

Dum Josefo kun Maria vojaĝis al Betlehomo, unu el la anĝeloj kunvokis ĉiujn bestojn, por ke inter ili li elektus plej taŭgajn, kiuj helpos al la Sankta familio.

Kiel la unua aliĝis leono. Nur reĝo estas inda servi al la reĝo de la mondo. Mi staros ĉe la enirejo kaj ĉiun, kiu volus al Jezuleto nur proksimiĝi, mi disŝiros. Vi estas tro malbona. Diris la anĝelo.

Kiel la dua aliĝis vulpo. Saĝe kun malkulpa rigardo ŝi volis persvadi la anĝelon. Mi estas la plej taŭga, ĉar ĉiun matenon, por la Dia filo mi ŝtelos la plej bonajn mielon, lakton kaj kokinon. La anĝelo diris, vi estas tre malhonesta.

Post tiuj vortoj montris pavo sian belegan voston. Kun mi eĉ ordinara stalo ŝanĝiĝas en reĝan palacon. Vi estas tro fiera, opiniis la anĝelo. Ankaŭ pluaj bestoj laŭdis siajn plej bonajn preferojn.

Al la anĝelo plaĉis eĉ ne elstareco kaj li ekvidis sur kampo labori azenon kaj bovon. Kaj alvokis ilin. Kion vi povas oferti? Nenion, respondis la azeno, nenion mi ellernis, diris ĝi modeste, krom mi konas nur paciencon kaj humilecon. Ĉio cetera alportos al mi nur batojn per bastono. Bovo levis okulojn al anĝelo kaj diris: Sed de tempo al tempo ni povus forpeladi muŝojn per niaj longaj vostoj.

Fine la anĝelo kontente ekridetis. Ĝuste vin mi bezonis.

El la libro
Vánoční příběhy pro potěchu duše
tradukis
J. Rýznarová

Ankaŭ bestoj havas bonan koron



Tiu ĉi foto estas konsiderata kiel la plej bona foto de la jarcento. La leonino kun sia ido unuafoje trairis tra savano, sed tiu varmego estis tiel terura, ke la leonido havis problemon pri la irado en tiu varmega tago. La elefanto, kiu en tiu momento estis proksime, ekkonsciis tiun problemon kaj tiun leonidon prenis en sia rostro kaj portis ĝin flanko ĉe flanko de la leonino ĝis la lageto, pri kiu ili sciis. Kaj ni nomas ilin BESTOJ. Mi ne konas tiom da homoj, kiuj nur tiom da homeco al tiu ĉi pruntus, nur tial, ke ni havas bonan koron.

La redakcio de AEH elkore deziras al ĉiuj legantoj agrablajn kristnaskajn festojn, travivatajn en plena sano kaj kontento.